

MARIA VENKAS

Robert Mäder

KAPO KAJ KORO

La Virgulino Maria estas ne nur por Lornamo. Dum la eklezia jaro ree kaj ree ni revenas al la Plejsankta Virgulino; sed ne tial, ke katolikismo estas poezia kaj ke en la Virgulino Maria ĝi havas neelĉerpeblan temon por retoriko kaj poezio, por muziko kaj pentroarto, sed tial, ke la Virgulino Maria havas en la Eklezio kaj en la *homaro centrala pozicion*. Sen Ŝi ni tute ne povas havi organikan, unuecan ideon pri la homa gento. Maria estas koro de la homaro, kiel Kristo estas ĝia kapo.

Eble ankoraŭ neniam ekde ses mil jaroj estis en la mondo tiom da klopodoj pri unueca grupiĝo de la homaro kaj nacioj kiel hodiaŭ. *La unueco estas duobla*: unu eliras de la Sankta Spirito, la dua de Lucifero; la unua estas produkto de la amo, la dua produkto de fiereco; la unua estas organika, la dua meĥanika: la unua estas katolika, la dua framasona.

Donoso Cortés foje demandis: Ĉu vi scias, kio estas la nuntempa revolucio? La lasta stadio de evoluo de la homa fiereco. La mondo ĝisfremeze fantazias pri grandioza unueco.

Satanan strebon pri unueco havis la homo dufoje. Unuan fojon, kiam li volis konstrui babelturon, duan fojon ĝin havas nuntempe, kiam pruda homaro volas elkonstrui unuecan mondon. La modernan Babilonon atendas la sama sorto kiel havis la biblia Babilono. Antaŭ ol estos finkonstruita ĝia turo, descendos Dio, por puni kaj disigi la naciojn. La alia unueco de la homa gento devenas de la Sankta Spirito. Ni povas ĝin nomi unueco organika aŭ katolika. Organika, ĉar ĝi elkreskas el interno laŭ leĝo de Dio. Katolikan, ĉar ĝi havas la saman taskon kiel katolikismo kaj ĝi volas enpreni en sin ĉiujn naciojn.

Tiu ĉi organika, katolika unueco de la homa gento *dependas* en tio, ke ĉiuj nacioj havas la saman kapon kaj la saman koron.



La kapo de la homaro estas Kristo, la koro estas la Virgulino Maria. Alivorte: La unueco de la homa gento konsistas en tio, ke ĉiuj nacioj havas la saman Patron kaj la saman Patrino: Jesuon kaj Maria-n. Plejparto de la homaro ankoraŭ post du mil jaroj ne scias, ke ĝi devas havi patron kaj la patrino; des pli malmulte scias, kiel tiuj patro kaj patrino nomiĝas.

Kapo de la homaro estas Kristo. La homaro estas tuto. Ĝi estas kontinua viva, organismo kiel ekzemple arbo aŭ viva korpo. Radiko de tiu arbo, kapo de tiu korpo, patro de homfamilio estas nature Adamo.

Sed Kristo, Filo de Dio, per enkarniĝo alligis al si la tutan homan genton eĉ kun Adamo. Per tio, ke Li akceptis la homan naturecon, kiu estis membro de la homaro, kaj tial kun la homaro nedisigeble kunigita, Li akceptis laŭ instruo de ekleziaj Patroj en certa senco ankaŭ la tutan homan genton.

La homa gento, kiel diras eminenta dogmisto Scheeben, apartenas al *persono de Kristo kiel korpo*, tamen ne tiel arde eĉ ne tiel senpere kiel la homa natureco de Jesuo. Per enkarniĝo Kristo iĝis kapo de la tuta homa gento. „Li estas antaŭ ĉio, kaj en Li ĉio ekzistas“ (Kol 1,17).

Laŭdire ni vivas en epoko politika. Sed neniam darfis politika saĝeco kontraŭi la fundamentajn leĝojn de Diaj mondordo kaj mondregado. Kiam do, kiel skribas sankta Paŭlo al Efesanoj, estas antaŭdecido de Dio „sumigi en Kristo ĉion, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero“ (Efe 1,10), tiel estas ankaŭ tasko de la *homa politiko* sumigi ĉion, kio estas surtere, kun Kristo kiel la kapo.

Ekzistas neniu rimedo, kiu donus al la mondo ordon, bonstaton kaj pacon. „Ĉar neniu povas meti alian fundamenton krom tiu, kiu estas metita, tio estas Jesuo Kristo“ (1 Kor 3,11). „Jesuo estas: Vojo, Vero, Vivo“ (Joh 14,6). Paca politiko, kiu tion forgesus, estus malprudenta. *Sen la kapo de la homa gento ne eblas regi la homaron*. Ne eblas regi la homaron sen Kristo la Reĝo.

Kaj ne eblas regi la homaron sen patrino. *Ne eblas ĝin regi sen koro de la homa gento*. Ne eblas ĝin regi sen la Virgulino Maria. *Protestantismo ne komprenas la Virgulinon Maria-n* kaj Ŝin ne komprenos, ĉar ĝi en Ŝi vidas nur privatan personon, ekzistantan mem por si. Ni komprenas la Virgulinon Maria-n bone, nur se ni rigardas en ŝia rilato al Kristo kaj la homaro. Kristo, Dio kaj homo, estas, kiel ni vidis, *centro de ĉiuj aferoj*. Kiel Dio Li estas kunigita kun Patro kaj kun la Sankta Spirito en mistero de la Plejsankta Triunuo, kiel homo Li estas kunigita kun tuta kreitaro kaj precipe kun homaro kiel ĝia kapo.

„Kion Dio kunigis, tion homo ne disigu“ (Mat 19,6). Se ni parolas pri Kristo, ni devas konsideri Kriston tutan. La tuta Kristo estas Kristo kiel Dio, Kristo kiel homo, Kristo kiel kapo. La tuta Kristo estas Kristo kun siaj membroj. Li kaj ni, kiel foje skribis sankta Aŭgusteno.

En tiu ĉi centra klarigo ni devas vidi

Maria-n. Ŝi estas patrino de Kristo, de la *tuta Kristo*. La patrino de Kristo, kunigita kun dieco kaj kun la homa gento. La patrino de la kapo kaj la membroj. La patrino lia kaj nia. Sed, kiel diras la sankta Aŭgusteno, nia patrino laŭ spirito, sed tamen vera patrino de la membroj de Kristo, kies ni estas.

El tio rezultas: *Maria staras centre de la kreitaro*, en centro de la homaro. *Ne kiel Kristo. Sed apud Kristo*. Kun Kristo. Pro Kristo. Estas nur ununura kapo. Estas nur unu, pere de kiu estas ĉio kreita. Estas nur unu, kiu en ĉio havas prioritaton, nur unu, en kiu ekzistas ĉiu pleneco kaj pere de kiu estas ĉio repacigita, ĉio surtere kaj enĉiele, kiam Li per sia sango sur la kruco ĉion pacigis (komp. Kol 1,17-20). Maria ne estas centro, sed Ŝi staras en la centro. Maria ne estas kapo, sed Ŝi estas koro de la homaro.

Kiel ne ekzistas unueco kaj paco sen kapo kaj kontraŭ ĝi, tiel ankaŭ ne ekzistas unueco kaj paco sen koro de la homaro kaj kontraŭ ĝi. Dio estas plena harmonio kaj volis, ke la homaro havu ne nur la kapon, sed ankaŭ la koron. Kaj kiam Li kreis praĉelon de la homa socio, familion, Li diris: „Ne estas bone, ke la homo estu sola; Mi kreos al li helpanton similan al li“ (Gen 2,18).

Tio validas ankaŭ por la homara familio. Se la homaro estus nur organizacio, ĝi ne bezonus koron. Sed la homaro ne estas nur organizacio, sed ĝi estas la viva organismo. Ĝi havas, kiel ni vidis, la kapon, devas do havi ankaŭ la koron, helpantaron, disdonantaron de la ĉielaj donacoj kaj trezoroj, edukantaron kaj vivtenantaron de infanoj.

Feliĉo kaj paco de la homa gento dependas do esence de la Virgulino Maria, ĉar sano de la organismo dependas esence de la koro. *Maria estas Reĝino de la Paco*. Mi ne scias, ĉu iam kadre de pacaj aŭ malarmadaj konferencoj okazis tiutema prelego. Sed mi scias tion, ke ĉiuj pacaj kaj unuecaj klopodoj estas vanaj sen Tiu, kiu la 25-an de marto de la jaro 1 iĝis patrino de la Kapo kaj tiel ankaŭ la koro de la homa gento, kaj tial la patrino de la paco.

VIVU LA REĜINO!

Se tiranoj sciuz, kiun potencon ni havas en la manoj, kiam ni preĝas rozarion, certe ili malpermesus ĝin sub minaco de prizonado aŭ ekzilo. Tiu preĝo infanece humila kaj virece persistema trafas la sortojn de la nacioj pli profunde, ol politikistoj antaŭsentas. Ĝia lasta celo estas falo de ateismo kaj renovigo de Jerusalemo. Leono la 13-a skribis en encikliko en 1895: „Ni atendas de forto de la rozario antaŭ ĉio helpojn por disvastigado de regno de Kristo.“

Maria estas vojo al la celo. *Celo de la ofensiva rozaria preĝo estas internacia agnosko de la tutmonda regado de Maria kaj per tio starigo de sociala regado de Kristo.* La nuntempo, proklamanta egalecon, havas malmulte da kompreno por tiaj vortoj. Socialismo strebas pri ebenigo de montoj kaj plenumo de valoj. Ĉio devas esti ebenaĵo kiel sur la dezerto. Katolikismo estas malo de socialismo. Ĝi estas ĉielatinganta katedralo super socialisma sablo de la dezerto.

Katolikismo estas hierarĥio, ordigita konstruo, de la simpla kaj malalta ĝis perfekteco. La socialisma devizo „egaleco“, eĉ se ĝin nuntempe papagumas plimulto da homoj, eĉ multaj senpripensaj membroj de nia Eklezio, estas el ĉiuj devizoj la plej sensenca, la plej sensaĝa, malplej arta, la plej malfeliĉa.

La katolika vorto hierarĥio, organismo, segmentiĝo, ordo estas racio, belo, vivo. Ĉar la videbla eĉ nevidebla kreitaro estas specigita artverko, ĝi devas havi supron. Ĉar ĝi estas katedralo, ĝi devas havi turpinton. Tio estas Maria. Maria, reĝino de la universo. *Celo de la rozaria pieco estas tiun realecon, mondan regadon de Maria, demonstri per floroj, lumoj, kantoj, preĝoj kaj per la tuta elokvento.*

Ni devas batali kontraŭ *protestanta* herezo, kiu la katolikan marialan kulton opinias kiel prudan kaj ne kredas, ke la Virgulino Maria per sia pozicio kaj graveco mastras la tutan kosmon.

Maria estas patrino de Jesuo. Jesuo estas

Dio. Ŝi do estas patrino de Dio. Kontraŭ tio ne estas objekto. Ĉiu infano tion komprenas. Ne estas pli alta digneo por la kreitulo ol honorindeco de la patrino de sia Kreinto. La Patrino de Dio estas ĝuste tial pli ol ĉiuj ceteraj homoj. Ŝi havas kronon kaj sceptron. Ŝi reĝas super tuta homa gento. Tio estas instruo pri Maria.

Prudi ĉi tie eĉ ne eblas. Prudi devus nur Dio, per tio, ke Li atribuis al Maria pozicion, kiu superas ĉion enĉiele kaj surtere. Kiel ne estas eble el la Virgulino Maria fari pli, ol el Ŝi faris Dio, tiel ankaŭ estas neeble diri pri Ŝi tro multe. Maria estas la reĝino.

Maria estas kunsavantino. Ŝi donis pli, ol al ni iam donis, povas doni aŭ donos kiu ajn homo. Jesuo estas la unua kaŭzo de la elaciĉeto. Maria estas la dua kaŭzo. Jesuo estas fonto de nia senkulpiĝo, Maria tubfluilo. *Kio estis vera en la 25-a de decembro de la jaro 1, tio restos vero, ĝis ekzistos la mondo: Jesuo al ni venas pere de Maria.*

Tial ne estas eble, ke ni estu de iu pli dependaj ol de Maria. Tial estas nenio pli sentebla, ol ke la rozario en primedito de la misteroj de nia savo kunigas ambaŭ tiujn nomojn: Jesuo, Maria.

Maria estas laŭ neeraripova kredartikolo *gracoplena*. Tion ne elpensis sacerdotoj, ne eltrovis scienculoj; tion proklamis Dio pere de sia anĝelo: „*Maria gracoplena!*“ (Luk 1,28). *Eĉ ne unu kanonizado dum dumil jaroj egaliga al tiu ĉi kanonizado el la 25-a de marto de la jaro 1 en senbrua nazareta ĉambreto.* Maria elstaras super ĉiujn grandaĵojn de la mondaj kaj ekleziaj historioj kiel maro super guto, kiel suno super sunradio.

Mi ripetas denove: Laŭdo de la rozario de Maria ne estas pruda. En la rozario nur ripetiĝas, kion diras evangelio de Luko 1,28: „*Gracoplena.*“ Se volas protestantismo venki en batalo kontraŭ la mariala kulto, ĝi unue devas forigi el la mondo evangelion de la sankta Luko 1,28, la oficialan Dian proklamon de la reĝado de Maria.

Pri la Virgulino Maria oni ne multon parolas. Nuna tempo, tiel malforta je kredo, estas rekte minacita per tio, ke en ĝi oni tro malmulte parolas pri Maria. Loreta litanio kaj la rozario estas kolektoj de gemoj en trezorejo de la Plejsankta Virgulino. Ĉiu preĝalvoko estas stelo sur ŝia ĉielo. Sed ĉiuj tiuj preĝalvokoj, kvankam ili ŝajnas al ni mirindaj, tamen ankoraŭ aparte ne esprimas tutan veron pri Maria. Ni bezonas esprimon tiel multampleksan, por ke ne plu estu ebleco diri pli: Maria, Reĝino de la Rozario, estas la Reĝino de la Universo.

La homo estas magranda mondo. Kio validas pri la mondo, tio validas ankaŭ pri tiu malgranda mondo, pri reĝejo, kiu estas ĉiu homestulo. *Ĝia reĝino estas Maria*. Dio en vi efikas pere de Maria. Maria estas patrino de Jesuo. Jesuo estas nia kapo (komp. Efe 1,24; 4,15; 5,23). En supernatura senco ni estas liaj membroj (komp. 1 kor 12,27). La patrino de la kapo estas ankaŭ patrino de la membroj. La patrino de Jesuo estas do ankaŭ patrino nia.

Ĉiuj senkulpigo kaj sanktigo estas preskaŭ nova enkarnigo de Jesuo. Ni estas koncipitaj el la Sankta Spirito, naskitaj el Maria la Virgulino. Maria nin spirite nutras, edukas, protektas. Ĉiuj gracoj devenas de la Sankta Spirito. Sed laborejo, en kiu nin la Sankta Spirito prilumas, fortigas, instruas, estas la koro de Maria. *Tial ĉiuj infanoj de Dio estas infanoj de la Virgulino Maria. Neniu havas Dion kiel patron, se ne havas Maria-n kiel patrino.*

El tio ni ekkonas, kial havas en la katalika eklezio la mariala kulto kaj precipe la rozaria preĝo tian signifon. Honoradon de Maria ni havas en la sango. Ĝi estas por ni kvazaŭ ennaskita. Ni ne povas aliel, *la infanoj devas ami la Patrino.* Maria ne estas por ni fremda, nekonata, ne estas por ni

neĉeestanta.

Sed el tiu ĉi rilato al la Virgulino Maria ankaŭ rezultas, kiaj nia estimo kaj amo al Ŝi apartenas. La mariala honorado devas esti infaneca. Ni ne eldiradu la preĝojn nur meĥanike, parkere ellernitajn. Ni honoradu la Virgulinon Maria-n honeste. Ni parolu kun Maria sincere, de la koro al la koro, kiel amantaj infanoj kun patrino. *La mariala honorado devas esti arda, entuziasma*. Ni devas post Jesuo ami Maria-n kiel neniu en la mondo, ĉar mem kompreniĝas, ke neniu nin pli multe amas ol panjo kaj precipe la Panjo tiel karega, bela, bonvolema, ke ne estas sub la suno kaj eĉ ne super la steloj panjo pli karega, pli bela, kaj pli bonvolema.

Nia estimo al la Virgulino Maria devas esti *konstanta*. Estus nenature, se la infano nur matene kaj vespere alparolus la patrino per kelkaj vortoj, kaj alitempe ĝi por ŝi havus neniu vorton. La infanoj parolas kun patrino pri ĉio kaj konstante. Ankaŭ ni tiel faru. Intime kaj sincere ni parolu kun Maria pri ĉio, kio koncernas nin, proksimulon, pri aferoj agrablaj, malĝojaj, religiaj kaj familiaj, politikaj kaj socialaj; ni petu ŝian konsilon, helpon, konsolon. Kiel ni ne laboras sen Jesuo, sen bona intenco, tiel ni ne laboru sen konsilo de la patrino, eĉ ne malproksime el la patrina vidodistanco.

La rozaria kaj mariala kulto al ni do la plejsanktan Virgulinon montras kiel reĝinon de la universo kaj la homa koro. Estas necese prikonsideri la faktojn. Se ni ignoras la faktojn, tio turnas sin je venĝo. Ignori Maria-n estas malfeliĉo. *Ju pli arde ni honoras Maria-n, des pli granda estos nia surtera kaj eterna feliĉo, nia politika kaj sociala bono*. Per rozari, se ĝi ne estas meĥanika lippreĝo, ni preparas kontraŭevolucion, renverson en la animoj kaj la koroj.

BATALO PRI VIRINO

Malnova legendo asertas, ke serpentoj, kiuj estas kruelaj malamikoj de la homo, malamas pli virinon ol viron, kaj tial pli ofte ŝin atakas kaj mortigas per mordvenenigo.

Se inter aro da viroj estas eble nur unu virino, ĝuste ŝin ili strebas mordvenenigi. Havu ĉi tiu opinio iun natursciencan bazon aŭ ne, certe ĝi havas bazon religian. Diablo, antag-

onisto de la homa gento, montras misteran kaj okulfrapan *furiozon kontraŭ virino*.

Batalo de satano pri virino klare kaj nepre vidiĝas kiel mondaganta fakto jam sur la unua paĝo de la Sankta Skribo. La Eternulo diris al la serpento: "Mi metos malamikecon inter vi kaj virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro, ŝi frakasos vian kapon, kaj vi pikados ŝian kalkanon" (Gen 3,15). La batalo pri la virino nedisigeble kunteniĝas kun granda batalo surĉiele: kun batalo pri Di-homo. Ĝi havas karakteron kristocentreca. Ĝi okazis pro virino kiel portantino de Kristo. Diablo volas en la virino trafi Di-homon.

Tiu ĉi mondaganta batalo de satano pri virino estas ankaŭ *la plej profunda enhavo de la rozaria preĝo*. Preĝi la rozarion ne estas nur la privata afero, estas tio kunago sur batalejo de granda monda interbatalo. Centro de tiu batalo estas virino kaj Drako. Objekto estas: regado de Kristo la Reĝo. Tri ĝiaj fazoj estas: batalo pri Eva, batalo pri Maria, batalo pri Patrino Eklezio.

Batalo pri virino estas antaŭ ĉio batalo pri Eva. Eblas diri, ke estis milita ruzaĵo, taktika, psikologia profitkalkulemo, sed estis tio ankaŭ principo. Kiam satano unue celas al Eva, ĝi celas la tuton. Ĝi al si diras: Se falos virino, ŝi kuintiros kun si ankaŭ viron, kaj se falos patrino, ŝi kuintiros kun si ankaŭ idaron.

Kristo en sia militplano opinias kristocentrece. Satano ĉiam opinias kristocentrece, sed en malamikeca senco. Se ĝi atakas virinon, ĝi ĉiam fine volas morttrafi tiun, kiu estas atendata: Kriston. En ombro de malpermesita arbo devas esti decidita sorto de granda kontraŭulo de satano. Atako de malantaŭe: mordovundo de kalkano. Sed mortige.

La batalo kontraŭ la virino estis en unuaj kvar miljaroj nura daŭrigo de delogista plano en edeno, kaj tial verdire la batalo kontraŭ Kristo. La homara arbo devus per revolucista veneno de la virina peko esti tiel malpurigita kontraŭdiece, por ke ĝi iĝu nekapabla alporti altvaloran frukton Kriston la Reĝon.

La batalo estis efektivigita pro virino kiel pri estonta portantino de Kristo.

Sataniste antikristeca atenco kontraŭ virino estis realigita el du flankoj. La virino devus esti allogita al falo antaŭ ĉio per *volupto*. La Sankta Skribo diras: "Kaj la virino vidis, ke la arbo estas bona por manĝi kaj ĝi estas ĉarma por okuloj, kaj la arbo estas dezirinda por saĝiĝi; kaj ŝi prenis de ĝiaj fruktoj, kaj ŝi manĝis, kaj ŝi donis kune ankaŭ al sia edzo, kaj li manĝis" (Gen3,6).

La diablo ŝteleniris en la animon de la virino per okuloj. La virino estis miopa. Ŝi ne divenis profundecon kaj malproksimecon de la afero. Ŝi ne pensis. Ŝi sin lasis ĉarmigi per ekstera ŝajno kaj emocio. La sensoj superregis racion kaj konsiencon. Tio estas ordinara procedo ĉe falo de la virino en pekon: La virino ekkonas, ke malpermesitaj fruktoj estas ĉarmaj por okuloj kaj bonaj por manĝo. Ŝi levas al ili manon. La volupto estas por virino vojo al la falo.

Satano ekspluatas ankaŭ *vantemon* de la virino: Vi estos kiel Diino. Oni komplimentos vin. Vi estos la unua, ne nur dua! Tio flatas ŝin. La virino estas laŭ Dia mondordo helpantino de viro. Ŝi estas la dua. Ŝia grandeco dependas de tio, ĉu ŝi estas tia, kian ŝin volas Dio. Ŝi havas kunlaboron, ne gvidon. Tion postulas humileco.

Lucifero pekis per tio, ke li ne volis esti dua, apud Kristo, kiu havas unuaecon. Per tiu ĉi opinio komencis revolucio surĉiele. Per serpento ĝi devus esti metita ankaŭ en virinon. La virino volis en la edeno havi unuan vorton. La virino volis surtere fariĝi centro, laŭ kiu ĉio sin turnas. La unua, ne la dua. Per tio komencas revolucio surtere. Ĝi devenas de Lucifero. Feminismo estas lucifereca. Ĝi eliras el satano.

La batalo pri virino estas bataolo pri Maria. Maria donis al la mondo Kriston la Reĝon, *la unuan*, la kapon de la nevidebla kaj videbla kreitaro. Maria opinias kristocentrece: en spirito de kredo, espero kaj amo. Kristo la reĝo estas por ŝi ĉio. Ŝi sin rigardas rilate al Li ĉiam kiel *dua*. La vera malo de

Eva. Ŝi estas la servantino de la Sinjoro. Ŝi do opinias antiluciferece. Kontraŭevolucie. Per tio Ŝi frakasas kapon de la serpento. Persone kaj ankaŭ kun sia Filo.

Kiel estas Maria kontraŭ Lucifero, tiel estas Lucifero kontraŭ Maria. En la batalo pri virino ĝi volas trafi precipe Maria-n. En prapatrino Eva ĝi vidas Maria-n. En ĉiu virino, precipe en virgino, ĝi vidas Maria-n. En ĉiuj landoj, kie ankoraŭ Lucifero reĝas, estis kaj estas virino estulo la plej malfeliĉa. Sklavino. Ĉiurimede ŝi estas malestimigata kaj subpremada. Tiu ĉi persekutado kaj malestimigado de la virino havas satanan devenon. Kaj tio direktas kontraŭ Maria.

Maria estis en sia patrino Eva kaj en siaj fratinoj, ĉiuj virinoj, eĉ persone persekutata tiel kolerege, ke la historioj apenaŭ tion kapblas skizi. Kio estis ŝia vivo de kripo ĝis kruco? Kiel ŝia Filo estas viro de doloro, tiel estas Ŝi virino de doloro. “Ho vi, ĉiuj, kiuj preteriras la vojon, rigardu kaj vidu, ĉu ekzistas sufero simila al mia sufero” (Lam Jer 1,12). Nure al Ŝi apartenas titolo Reĝino de Martiroj. Satano Ŝin malamegas senlime.

Batalo pri virino fine estas batalo pri la Eklezio. La Eklezio estas mistika virino, fianĉino de Kristo, patrino de Diaj infanoj. Kiel spirita patrino ĝi estas plue vivanta dinaskintino, kiel per sia kapo ĝi plu estas vivanta Kristo. Kiu parolas pri Eklezio, parolas pri Kristo. Kiu parolas pri Eklezio, parolas pri Maria. Kiu malamas Eklezion, malamas Kriston. Malamas Maria-n. Satana persekutado de la Eklezio estas ĉiam antikristeca kaj antimarieca: malamikeca al Kristo kaj malamikeca al Maria. Tial Apokapiso de Sankta Johano en la 12-a ĉapitro priskribas persekutadon de la Eklezio fare de satano kiel batalon de drako kontraŭ virino.

ŜI FRAKASOS VIAN KAPON!

Konata jam mortinta svisa universitata profesoro estis jam staranta antaŭ eniro en la katolikan eklezion. Sed li ne havis kuraĝon eniri. Liaj infanoj pri li diradis: „Paĉjo ves-

„Kaj kiam la drako vidis, ke ĝi estas ĵetita sur la teron, ĝi persekutis la virinon, kiu naskis la viran infanon. Kaj al la virino estis donitaj la du flugiloj de la granda aglo, por ke ŝi flugu en la dezerton, sur sian lokon, kie ŝi estas nutrata tempon kaj tempojn kaj duontempon, for de la vizaĝo de la serpento. Kaj la serpento elĵetis el sia buŝo, post la virinon, akvon kvazaŭ riveron, por ke ĝi igu ŝin forportiĝi de la fluo. Kaj la tero helpis la virinon, kaj la tero malfermis sian buŝon, kaj englutis la riveron, kiun la drako elĵetis el sia buŝo. Kaj la drako furiozis kontraŭ la virino, kaj foriris, por fari militon kontraŭ la restintojn de ŝia idaro, kiuj observas la ordonojn de Dio kaj havas la ateston de Jesuo“ (Apo 12, 13-17).

La diablo malamegas la Eklezion, ĉar ĝi estas mistika virino, fianĉino de Ŝafido, patrino de fratoj kaj fratinoj de Jesuo. Satano malamegas la virinon.

Ni diras denove: Se ni preĝas rozarion, ni konsciĝu, ke per tio *ni eniras sur mondan batalejon*, ke ni helpas al virino en sesmilara batalo kontraŭ drako. *La rozario estas io verdire militeca*, antilucifereca. La rozario estas kiel ekzorcismo. Ĝi ekzorcas diablon.

El rozario ni ankaŭ ekkonas, kiel la virino estas en monda okazado treege potenca. Ĉiu pereoj kaj ĉiu savo en la mondo komencas per virino: per Eva aŭ Maria. Ĉiu virino havas ion el Eva aŭ el Maria. Cherchez la femme! Ni serĉu virinon!

Kiu volas la homaron vere enpeli en abismon, tiu laŭ modelo de Lucifero strebas stariĝi en la virino voluptemon kaj fieron per obscena modo kaj radikala amanciipiĝo. Kaj male. Kiu volas la homaron savi, tiu ŝirmu la virinon, tio estas fari ŝin marialeman: humiln kaj puran. Savo de la virino estas granda tasko de Kristo la Reĝo.

pere ludadas kun globetoj.“ Ili ne konis tiun neordinaran ludon, sed ni ĝin konas. Li preĝadis la rozarion.

En la preĝejo kaj ankaŭ en la familio

ni *volonte ludadas kun globetoj de sanktuloj*. Ni estas konvinkitaj, ke, se ni tion faras atente kaj ame, ni faras per tio al homa socio pli grandan servon ol diplomatoj, kiuj ludas sur politika ŝakludejo. Se ni preĝas la rozarion dece, ne senpripense kaj mekanike, ni venkos ŝtatestojn en grandega lukto de lumo kontraŭ mallumo. Ĉiu bona preĝo de la rozario *estas spirita malŝarĝo*, ia ekzorcismo kontraŭ diablo en senco de la Sankta Skribo: „*Ne donu lokon al la diablo!*“ (Efe 4,2). *Retiriĝu, malpura spirito, kaj disponigu lokon al la Sankta Spirito!* La rozario estas nenio meĥana, sed ĝi estas nia meĥana pafilo. Per la rozario ni plenumas insistan praktikan laboron por estanteco kaj estonteco. *La rozaria preĝo estas servo milita.*

La surtera vivo estas io alia, ol la plimulto de la homoj opinias. Ne estas tio komforta kaj enua vagado en la mondo. Ne estas tio pelado post papilioj de tiuj eternas infanoj, kiujn ni nomas homoj. Ne estas tio kverelemo pro manĝujo. Ni devas esti kuraĝaj, por ne nur el predikejoj kaj konfesejoj, sed ankaŭ aliloke proklamadu: *Aŭ Dio, aŭ diablo!* La historion oni ne povas ekspliki, se ne ekzistas kompreno pri demonecaj aferoj. Eblas tion klare ekkoni el biblio kaj la ekleziaj preĝoj.

Apenaŭ la infano akiras uzadon de intelekto, kiel diras moderna verkisto, komencas satano pro *ĝia animo ludi* kontraŭ Dio grandan ŝakmatĉon. Li batalas senlace, paŝon post paŝo, malfermite kaj inside, per movoj bone pripensitaj, ruzegaj, ofte geniaj, pri reĝo eĉ kampisto, pri episkopo eĉ rajdanto.

Nuntempe ni estas tiel malproksime, ke la *diablo povas esti nomata reganto de la mondo*. Moderna mondo staras ekster Dio, ekster Kristo, ekster Eklezio. Satano povas esti kuraĝe opiniata kiel animo de jarcento. Per mondaj amaskomunikiloj, mamonismo, sendieca socio parolas Lucifero. Li estas kontraŭdieca, personigita negacio. Negacio. De Maistre en nuntempa sociala ateismo facile ekkonus *satanan karakteron*, kiun li vidis en franca revolucio.

Kiam satanismo estas kontraŭ kristanismo, la *kristanismo estas kontraŭsatanismo*. Kristo promesis antaŭ sia ĉieleniro: „Tiujn, kiuj ekkredos, sekvos jenaj signoj: en mia nomo ili elpelos demonojn“ (Mar 16,17). Eĉ se ekzorcisteco estas specifa eklezia konsekro kaj la ekzocisman rajtas praktikadi nur sacerdotoj kun episkopa permeso, tamen povas kaj devas ĉiu baptita kaj konfirmaciita homo esti en certa senco ekzorcisto, povas kaj devas ekzorci diablon, kaj tion per defensivo kaj ofensivo, defendo kaj atako.

Sorto de la animo kutime decidiĝas *surlime* kiel sorto de lando. Ni devas surlime konstrui solidajn fortikaĵojn, ni devas zorgeme gardi sensojn, animajn enirejojn, ĉie ni devas starigi *gardojn, kiuj preĝas*. Ni ne darfus kuraĝe tro proksimiĝi al la malamika teritorio. Ni gardu nin kontraŭ proksima okazo en ĉiu direkto. *Ni ne traktu. Ne faru kompromisojn*. Ni ne traktu kun serpento. Tio estas *taktiko de la Virgulino Maria*. Ŝi estu nia modelo en la privata eĉ politika vivoj. *Malgrandaj kompromisoj kaj malgrandaj nesingardecoj surlime ofte decidas pri rezulto de milito.*

La Virino kun Infano, frakasanta kapon de serpento, estas centro de la rozaria preĝo. Ĝi devas en ni vekti spiriton de katolika ofensivo. *El okupaciita teritorio ni devas diablo forpeladi*. Ĉiuvespere dum konscienc-ekzameno. Dum ĉiu pekkonfeso. Pento, intenco, pekkonfeso, absolvo celas kiel ekzorcismo elpeli diablon. Tial la malbona spirito la konflikte malamegas.

Sed kun tio kavaliro de Maria ne povas esti kontenta. Sian alvokiĝon al akzorcado per preĝo kaj batalo ni devas konsciiĝi ankaŭ en publika vivo. *Kio devas esti vera katolika mondpolitiko?* Publika ekzorcismo, deklarita per buŝoj de viroj kontraŭ sendieca mondo.

Ni ne finkonstruos regnon de Kristo la Reĝo, ĝis kiam la vortoj de la Skribo „ne donu lokon al la diablo“ (Efe 4,27) ne fariĝos al ni, modernaj homoj, bazo de la katolika mondkoncepto, ĝis kiam senbrida

moderna libero de la kredo, konscienco, parolo kaj preso ne estos venkita. Unue devas eksteren malbonaj spiritoj de la jaro 1789, pri kiu parolas de Maistre. La rozario devas en tiu ĉi direkto efiki kiel universala potenca ofensivo kontraŭ demonismo en la monda atmosfero: ĝi devas purigadi, ekzorci malbonajn spiritojn, liberigadi.

Sed la rozario kiel adventa preĝo devas ankaŭ preparadi *vojon de pli bona katolika estonteco*. La rozario estas io ĝoje venka, decida en la batalo, die optimisma. *La rozario plirapidigas alvenon de Pentekosto*. Se la nacioj preĝas kun la Virgulino Maria, descendas la Sankta Spirito.

Ŝajnas, ke la nuna malĝoja tempo ne agnoskas kristanan optimismon, kiu estas en la rozaria preĝo. Ni vivas pli en la tempo de renversoj kaj disfaloj ol de renovigo kaj kreado. Sed ĉu revolucioj ne deprenas ĉion putritan, por konstrui templon de la Sankta Spirito? Ĉu Dio povas konstrui tie, kie jam

konstruis aliulo? Ĉu ambaŭ povas loĝi sur la sama loko? Ĉu ne vivas la homaro en periodo, kiun antaŭloj nomis via purgativa – la puriga vojo?

Ĉu plagoj, kiuj nin trafis kaj eble ankoraŭ trafos, ne havas celon purigi grundon, sur kiu devas esti konstruita Eŭropo? De Maistre diras: „*Se ion forviŝos Providenco, estas evidente, ke Li volas skribi denove.*“

Tial ni kun cetera kristanaro *ekprenu rozarion kaj nian militprogramon, kiun ni ekkonis en lernejo de Pio la Dekunua, kun fido ni ĝin metu al piedoj de la Patrino, kiu frakasas kapon de la serpento*. Jam delonge ni elkreskis el moderna superstiĉo, ke la mondo povus ŝanĝiĝi per ardaj frazoj, ĉu liberalaj aŭ katolikaj.

Kiel en komenco de kreo *vekigos Dio ankaŭ nun mondon el nenieco de nia senpoveco. Ni preĝu*. La Virgulino Maria estas nia devizo, la sankta Mikaelo nia gvidisto.

PRI KONKERADO DE LA MONDO

Estas advento. Nokto proksimiĝas al mateniĝo. *Komenciĝas nova, granda tago*. La suno ankoraŭ ne aperis super horizonto, sed inter densaj nuboj brilas aŭroro. Tiel estas ankaŭ en spiritordo. Eĉ komencanto en spiritastronomio scias, ke post aŭroro aperos suno, post Maria Jesuo.

En la 8-a de decembro 1854 ekbrilis sur nokta ĉielo de la moderna tempo Stelo Aŭrora. Kiam Pio la Naŭa solene proklamis kredogmon pri Senmakula Koncipiĝo, li antaŭsentis, ke komenciĝas momento de la monda signifo. Li sin esprimis profetece: „Ni havas certecan esperon kaj absolutan fidon, ke la Plejsankta Virgulino, tute bela kaj senmakula, kiu venkobatis venenan kapon de kruela serpento kaj al la mondo alportis savon kaj por la tuta terperiferio Ŝi estas potenca perantino ĉe sia Filo kaj kiel la plej forta ŝirmantino Ŝi venkis kontraŭ ĉiuj herezoj sur la tuta mondo, atingos nun per sia potencega perantineco tion, *ke la sankta Patrino la katolika eklezio, post kiam*

ĝi superos ĉiujn malfacilaĵojn kaj herezojn, ekfloros kaj reĝos de maro al la maro, kaj ke estos unu ŝafejo kaj unu paŝtisto. La katolika mondeklezio efektiviĝos.“

La hormontrilo sur la mondhorloĝo ne retroiras. La aŭroro estas sur la ĉielo. Pio la Naŭa, Leono la Dektria, Pio la Deko, Benedikto la Dekkvina, Pio la Dekunua, kiuj el astronomia observatorio vidas pli malproksimen kaj pli klare ol la aliuloj, ne ĉesis dum 75 jaroj pri tio atentigi per oftaj enciklikoj. Jare 1904 skribis Pio la Deko: „La interna voĉo al ni diras, ke tiuj atendadoj baldaŭ plenumiĝos. *La savo estas pli proksime, ol ni atendis.*“

Se la danĝero plej grandas, Dio plej proksimas. Ni esperas baldaŭ ekvoki: Dio rompis bastonon de malpiuloj. Ripozas kaj silentas terperiferio. Ĝi ĝojas kaj jubilas. Ni konsentas ankaŭ en tiu afero kun Romo. La Aŭroro, pri kiu la papoj de la deknaŭa kaj dudeka jarcentoj tiel okulfrape parolas kiel pri portantino de la paco, aŭguras al ni baldaŭan

suneliron. Pere de Maria venos Jesuo.

Ĉielenpreno de la Virgulino Maria estas tago de surtronigo de la Dia Patrino. Tiu ĉi somera mariana festo estas esprimo de spirita mondregado de la Virgulino Maria. Reĝoj surtrone ne ripozas, sed el ĝi reĝas. Pere de regado de Maria alvenas regado de Jesuo. Tiu ĉi ideo devus esti senĉese heroldata al ĉiuj nacioj. La 15-a de aŭgusto estas ĝuste la same krita tago por infero kiel la 8-a de decembro. La regno de tiu ĉi mondo devas esti faligita kaj sur ĝia loko konstruita ĉiela regno: regno de Maria kaj Jesuo.

Verdire ĉiuj katolikaj koroj kaj ĉiuj veraj katolikaj spiritoj devas klopodi pri spirita mondregado de Jesuo. *Kiel etaj homaj vermoj estadas ni la katolikoj!* Kiel senlime modestajn postulojn ni havas! Ne plu estas en ni fajra militemo eĉ ne volo regi. En publika vivo ni kontentiĝas pri kelloĝejoj kaj subtegmentejoj. Eĉ ne venas al nia menso, ke ni iam povus esti hejmsinjoroj. Kiel infanoj ni ĝojas pro ĉiu panero, kiu falas el tabloj de la sinjoroj de tiu ĉi mondo.

Ni ja parolas optimisme pri disfloro de la katolika vivo, sed facile ni forgesas, ke ekster sakristio ni ne havas rajton paroli, ke la publika vivo, stratoj, laborejoj, ĉiam pli perdas malnovan, katolikan karakteron kaj enfalas ateisman laikismon.

Ni forgesas, ke la katolika familio ne plu estas digo kaj fortikaĵo kontraŭ modernaj herezoj kaj falsaĵoj, ke preskaŭ ĉiu gazetaro estas en la manoj de liberaluloj, socialistoj kaj materialistoj, ke enmonde ni apenaŭ trovas unu ŝtaton, kiu estus direktata per vere katolikaj principoj. Ĉie regas liberalismo.

Ni ne plu regas. Ni ne scipovas regi. Ni eĉ ne plu volas regi. La eklezio estis iam reĝino. Estis al ĝi forprenita krono, mantelo kaj sceptro. Ĝia trono estis translokigita en muzeojn. Anstataŭ ĝi estis donitaj al ni kelkaj verdaj brakseĝoj, sur kiuj kune fratece laboras katolikismo, herezeco, framasonismo, socialismo, liberalismo kaj judaismo. La ideo, ke la Eklezio estas invitita al mondregado, jes al memregado, iĝis por ni

tiel fremda, ke eĉ katolikoj timas antaŭ ĝia aŭdaco.

Ni ne plu volas konkeri, ne plu volas regi. Nur ni ankoraŭ volas kun aliuloj dividi la vivon, la vorton, la regadon. Tronon ni ne plu volas. Ni estas kontentaj, ke ni havas kelkajn verdajn brakseĝojn. Ni ne plu volas ĉion, ni estas kontentaj pri parto. Ni ne plu kredas pri mondreganta misio de la katolika vero kaj kristana moralo.

En festo de Kronado de Reĝino de la Ĉielo kaj la Tero devas esti al tiu modesta kompatinduleto, al la hodiaŭa nana katolika popolo, anoncite, ke *celo de nia laborado estas spirita konkero kaj prirego de la mondo* per katolikismo. Ni scias, ke nek post unu jaro nek post dek jaroj ni konkeros la mondon. Pri tio eĉ antaŭĉio ne temas.

Antaŭ ĉio devas ĉiu, kaj sacerdotoj, kaj ĉiuj ceteraj, viroj, virinoj, katolikaj verkistoj kaj politikistoj, komenci kredi je majesta kaj grandioza misio, je tio, kion la Sankta Patro nomas *regno de Kristo*.

Plue ni devas pri tio paroli. Ja ni ne estas sekreta sekto. Kion ni volas, tion povas scii la tuta mondo. Framasono volas, ke la homo vivu laŭ liaj frazoj. Liberalulo volas, ke la tuta mondo estu liberala, kaj vidas en tio savon de la nacioj. Socialisto volas, ke socialismo estu akceptita de ĉiuj kiel evangelio de libereco kaj egaleco. Estas evidenta, ke la *konvinkita katoliko tage nokte pri nenio alia pensas, ol ke la tuta mondo iĝu katolika kaj feliĉa*. Kiu tion ne sopiras, ne rajtas sin nomi katoliko.

Fine ni devas pri tiu ĉi spirita mondregado de la Eklezio *preĝi*. Se ni preĝas, ni tiel preĝu: „*Sanktigata estu via nomo. Venu via regno. Fariĝu via volo kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero*“ (Mat 6,9-10). La preĝo verdire Dia estas la preĝo katolika, la preĝo pri Dia mondregado en ĉiuj animoj, en ĉiuj statoj, ĉiuloke. La nomo, regno kaj volo de Dio ke estu ĉieĉeestantaj kiel Dio mem. Kio estas Dia, tio ne estas nur por iu limigita tempo, por iu loko, eĉ ne por iuj homoj. La afero de Dio volas porti kronon kaj sceptron,

mem sidi surtrone, ĉie, ĉiam. *La celo kaj granda ideo de ĉiuj katolikaj koroj kaj ĉiuj katolikaj spiritoj estas spirita mondregado, memregado de Dio.*

Survoje al la reĝejo de Jesuo estas la reĝejo de Maria. Mi agnoskas kaj konfesas, ke estas nur ununura ĉiopotenca Dio kaj ke Dio, la estulo senlime perfekta, bezonas neniun. Mi agnoskas kaj konfesas, ke Maria, kvankam Ŝi ĉiujn kreitulojn tre superas, havas ĉiun perfektecon de Dio, kaj ke Dio Ŝin per sia perfekteco senlime superas. Sed tamen mi agnoskas kaj konfesas, ke Dio, kvankam Li neniun bezonas, savos la mondon nur *kun Maria kaj pere de Maria.*

Pere de Maria venis Jesuo. Tio estas realeco mondsignifa, plejsupere grava. Ni memorigas ĝin al ni ĉe anĝeluso matene, tagmeze kaj vespere. Pere de Maria alvenas Jesuo surmonden. Tio okazis ne nur la 25-an de marto kaj la 25-an de decembro de la jaro 1. Tiu ĉi historia evento ne okazis nur unufoje. Ĝi okazadas senĉese. Ĝi iĝis supernatura modleĝo.

Maria ne estas nur privata persono, ĉar eĉ ne ŝia Filo estas privata persono. Kiel ni pere de ŝiaj manoj ricevis savon, tiel ankaŭ ĉio, granda kaj malgranda, surĉiele kaj surtere, pasas tra ŝiaj manoj. Maria estas reĝino. Ŝia reĝejo estas universo. Ŝia trono estas ĉielo. Timzorgaj animoj en tio vidas konkurencon. Ili ne scias, kion ili parolas. En regno de Dio ne staras trono kontraŭ trono, reĝejo kontraŭ reĝejo, regado kontraŭ regado. Unu Dio, unu regno, unu reĝejo.

Maria ne havas privatajn interesojn, privatajn dezirojn. Ŝi volas nur unu aferon, pensas nur pri ĝi kaj laboras nur pro ĝi: alveno de la regno de Jesuo, sanktigo de lia nomo, plenumo de lia volo. Kvankam Maria iĝis reĝino de la universo, tamen Ŝi estas nur tiu, kiu Ŝi ĉiam estis, la servantino de la Sinjoro. *Jesuo estas ĉiam ŝia ĉio.* Sed Ŝi estas servantino de Dio sur la plej supera el ĉiuj tronoj sub la trono de la Plejaltulo. Servantino de Dio estas reĝino de la universo, kronita patrino.

Ni ne povas imagi al ni katolikismon sen Patrino de Dio. Sed eĉ ne ni povas imagi Patrino de Dio sen la katolika eklezio. La eklezio surtere havas principon: Pri Maria estas neniam sufiĉe! Programo de Maria enĉiele kaj ŝia registara politiko estas: *Pri la Eklezio neniam estas sufiĉe!* En amo al la Eklezio neniam eblas komuti. En entuziasmo pro Eklezio ne estas ekstremo. En laboro por la Eklezio estas neniam sufiĉe!

Politiko de Reĝino de la universo estas konservo, disvastigo, sanktigo, spirita mondregado de la Eklezio, politiko de Patronia. Venu via regno! Kion ĉiuj papoj, episkopoj kaj sacerdotoj, ĉiuj sanktuloj kaj martiroj kaj misiistoj dum 1900 jaroj faris por la katolika afero, tion ili realigis kiel ekzekutivaj organoj de la Reĝino de la universo. Neniu tion pli ĝuste sentas, kiel herezuloj. *Ĉiuj herezaj instruoj malamas Maria-n*, malestimas Maria-n, aŭ almenaŭ Ŝin ignoras. Ili scias kial. Ŝi mem, kiel oni legas en breviero, superis ĉiujn herezojn sur la tuta mondo.

La politiko de la Reĝino de la universo estas spirita mondregado de la Eklezio en batalo kontraŭ mallumaj grandpotencoj. Tri tronoj: la trono de la Reĝo, la trono de la Reĝino, la trono de la sankta Petro en Romo. Tri tronoj, *sed ununura reĝejo.* La reĝejo de Kristo estas la reĝejo de Maria. La reĝejo de Maria estas la reĝejo de la papo. La dua peto en la preĝo de la Sinjoro estas la preĝo de Maria. La preĝo de la Eklezio, la preĝo katolika. Filo kaj Patrino kaj anstataŭilo: Kristo, Maria, Petro havas la samajn celojn.

La Ĉielenpreno de la Virgوليو Maria estas soleno de surtronigo de la Reĝino de la Universo. En tiu granda tertremo, kiu dum dudek jaroj tremas la mondon, falas ankaŭ tronoj reĝaj. Sed tri tronoj ne ŝanceliĝos: la trono de Jesuo, Filo de Dio, la trono de lia Patrino kaj la trono de lia anstataŭilo. Laŭhome dirite ĉio ŝajnas esti perdita. Nenio montras al proksima venko de lia Eklezio. Sed estas la leĝo de la Dia Providenco, ke la Sinjoro Dio estas la plej proksima, kiam la mizero estas la plej granda.

Alia leĝo: *Kiam estas proksime Maria, proksime estas ankaŭ Kristo.* En lastaj jarcentoj oni ofte aŭdas pri aperoj kaj mirakloj de la Virgulino Maria. Ni aŭdas Patrinan voĉon. La Aŭroro brilas. Ni ripetu vortojn de la sankta papo Pio la Deko: La interna voĉo al ni diras, ke la atendado baldaŭ efektiviĝos: La regado de la Eklezio de maro al la maro,

paco, libero, unu ŝafejo kaj unu paŝtisto. La 15-a de aŭgusto, kronigo de la Patrino de Dio, estas luma brilo en malhela nokto. Nia savo estas pli proksima, ol ni supozas. Maria, la Reĝino de la Universo, estas nia espero, nia konsolo. Ŝi estas diplomatistino, kiu ankoraŭ foje alportos al la mondo pacon kiel antaŭ 1935 jaroj.

VIA SIGNO

„*Kaj granda signo vidiĝis en la ĉielo:* Virino vestita per la suno, kaj la luno sub ŝiaj piedoj, kaj sur ŝia kapo krono el dek du steloj. Kaj vidiĝis alia signo en la ĉielo; kaj jen granda ruĝa drako, havanta sep kapojn kaj dek kornojn, kaj sur siaj kapoj sep diademojn. Kaj la drako staris antaŭ la virino, por ke ĝi formangu ŝian infanon. Kaj fariĝis milito en la ĉielo: Miĥael kaj liaj anĝeloj ekmilitis kontraŭ la drako. Kaj ĵetiĝis malsupren la granda drako, la antikva serpento, nomata Diablo kaj Satano“ (Apo 12, 1-9).

Tio estas bildo el Apokalipso de sankta Johano. La grandioza sceno el granda batalo inter la ĉielo kaj la infero. La bildo al la 8-a de decembro el nevidebla batalejo de la spiritoj. Oka la decembro, kvankam ĝi estas

pramalnova kristana festo, akiris en la jaro 1854 la plej modernan gravecon. La Senmakula Koncipiĝo de la Virgulino Maria iĝis signo, signalo en furioza batalo de la spiritoj. Ĝi iĝis surĉiela signo, laŭ kiu ni devas direkti niajn taghorojn.

La signo kontraŭ la signo. Maria kontraŭ la malnova serpento, kiu nomiĝas diablo kaj satano kiu furiozas sub ŝiaj piedoj. Ne temas ĉi tie pri iu izolita montara vilaĝeto, pri unu opaj heroldantoj de malfideleco aŭ pri malbonaj verkoj.

La personoj kaj iliaj nomoj ĉi tie ne estas gravaj. Ĝi estas decidema batalo inter ambaŭ grandaj signoj surĉiele. *Maria, aŭ satano!* La Virino per la suno vestita, aŭ drako! Ni elektu. Ni devas elekti.

Maria, granda signo surĉiele por moderna virino

Okazis antaŭ pli ol cent jaroj. Al Tirolo elsude direktis sin armeo. Estis milito. Venkanto antaŭiĝis al Spinges. Antaŭ tabernaklo arde preĝas svelta, pia knabino. En ega timo ŝi preĝe kunstreĉas la manojn, kun teruro ŝi aŭdas ĉiam pli proksimajn batalbruojn kaj elpafojn, kiuj rapide proksimiĝas.

Subite ŝi eksaltas kaj ŝlosas la preĝejan pordon. Ŝi vidas, kiel la unuaj malamikoj kaŝiras laŭ tombeja muro. Ŝi ekkrias. Ŝi vokas: „*Jesuo, Maria, preĝejo, preĝejo!*“ Ŝi timegas pro malsanktigo de la sanktejo. Ŝi estas kiel leonino. Ŝi batalas per forkego. Kun vilaĝanoj, kiuj alkuris, ŝi interbatalas kiel soldato. Kiel anĝelo kun flama glavo ŝi staras antaŭ ŝlosita pordo kaj ŝirmas la sanktejon.

La soldatoj estas per ŝia braveco kvazaŭ ŝokitaj. Ili malsupreniĝas bajonetojn kaj foriras. La preĝejo kun la Plejsankta Sakramento estas savita. La knabino el Spinges poste estis ovaciita fare de historiistoj, poetoj, pentristoj kaj skulptistoj. Ŝi estis kampula knabineto, sed ŝi havis en la manoj bonon kaj malbonon de preskaŭ la tuta nacio. Heroino.

Ne okazis la unuan fojon, ke la simpla virino savis la nacion. Ni rememoru Jeanne d'Arc. Ĉu en nia malfacila tempo estos same? Maria, granda signo surĉiele, havas *gravan postulon je la tuta moderna virina mondo.* Starigu vin al la pordoj de la preĝejoj kiel keruboj, gardostaru antaŭ tabernakloj, savu

Jesuon por via homaro kaj viaj infanoj. Vivu en sanktiga graestato. Ŝirmu ĝin en viaj infanoj kaj konservu ĝin en la nacio.

Virinoj, estu heroinoj! Preĝu, kiam ekstere furiozas batalo kaj ĉiam pli ĝi aŭdiĝas en la sanktejo. En angoro kunpremu manojn, por savi tion, kio estas por vi la plej valora. Estu modernaj preĝantinoj, kiuj havas la okulojn malfermitajn por la mondo kaj ĝia mizero, do ankaŭ por libero de la Eklezio,

Maria, granda signo surĉiele por moderna viro

Iu fama verkisto vokas pri *kavalira spirito*. Multaj homoj ne plu scias, kio estas tio. Estis belega periodo en floranta mezepoko, kiam la kristana kavaliraro, bona malnova nobelaro, elingis glavon kontraŭ ĉiu maljusteco. Kiel unuan devon oni opiniis ŝirmon de malfortuloj kaj subpremuloj, precipe sendefendajn virinojn kaj sendefendajn sacerdotojn. Esti kavaliro signifas per potenco, havaĵo kaj sango protekti suferantan senkulpecon kaj subpreman rajton.

Hodiaŭ estas tio ofte male. Pli grandajn simpatiojn ĝuas granduloj, posedantoj de granda pugno ol malfortuloj, malriĉuloj, vidvinoj kaj orfoj.

Nur *malantaŭ la kurteno* ni rigardas tion, kiel tiraneco piedpremas rajtojn, kaj ni silentas, por ke ni la grandajn sinjorojn ne kole-rigu kontraŭ ni. Nur pasive ni alrigardas, kiel senkulpeco sangas el mil vundoj. Ni ne volas kaŭzi voĉbruo kaj rompi tiel nomatan pacon, tio estas neĝenitan regon de la rasa perforto.

Ni diras, ke neniel helpas batali kontraŭ superrego de malbono, kaj de pli komfote ni kuŝĝuas sur divano. Mallonge, ni havas multajn barbulojn, sed malmultajn kavalirojn. Kristo Sinjoro, Fortulo, tion faris alimaniere. Lia forto havis nenion komunan kun mond-potenco, riĉeco, spirito de la tempo. Kristo estis tuta kavaliereco de kapo ĝis kalkano.

Li estis viro de malgrandaj, malfortaj, forpuŝitaj kaj persekutataj. *Li protektis*

por katolika gazetaro, por lernejo, por balota lotkorbo.

Enmiksiĝu per viaj preĝoj en la vivon. Ne nur preĝu, sed ankaŭ agu. Per instruo, kunlaboro, kuraĝigo. Kaj antaŭ ĉio vi, patri-no, devas stari antaŭ sojlo de via domo! Kiel heroino! Bruligante per via rigardo ĉion, kio alportas danĝeron. Malbonajn homojn, malbonan gazetaron. *Estu gardistino pro Kristo!*

subpreman veron. Unue li pensis pri ĉiuj ceteruloj kaj fine pri si. Atesto de tio estas Golgoto kaj la tuta lia vivo.

Tia estis ankaŭ Maria. Ŝi estis virino vestita per suno. Sed Ŝi ne ŝvebigis sin en sia sankteco kaj ne fermiĝadis. Ŝi estis kavali-lica. Pro amo kaj sindono al kompatinda pekema homaro ŝi vivis vinon de la ofero. Kaj tiel Ŝi estas granda signo surĉiele ankaŭ por la viroj.

Ni ne devas klami. Ni ne devas senbezone svingi la glavon. Sed se tio iam devas esti, do montru, ke vi estas vivo.

Kiu volas, tiu hurlu kun lupoj. Tio ne estas braveco. Vi estu kavaliro nobla, sed forta. *Ĉie protektu subpreman rajton kaj suferantan senkulpecon*. Per tio oni ne batalas kontraŭ la homo, sed kontraŭ la drako, kiu nomiĝas satano.

Kiu estas baptita kaj konfirmaciita, tiu scias, sub kiun standardon li ekstaru la 8-an de decembro. Ĉu al Maria kun Infano, aŭ al la diablo. Tio estas decidema batalo inter ambaŭ grandaj signoj surĉiele.

Kaj denove mi malfermas Libron de libroj. Kaj mi legas: „Timu Dion, kaj donu al Li gloron, ĉar venis la horo de Lia juĝo; kaj adorkliniĝu al la Kreinto de la ĉielo kaj la tero kaj la maro kaj la fontoj akvaj. Se iu adorkliniĝas al la besto, tiu ankaŭ trinkos el la vino de la kolero de Dio, kiu estas pre-tigita nemiksita en la pokalo de Lia kolero, kaj li turmentiĝos en fajro kaj sulfuro; kaj la

fumo de ilia turmento leviĝas por ĉiam kaj eterne; kaj ne havas paŭzon tage kaj nokte tiuj, kiuj adorkliniĝas al la besto kaj al ĝia bildo“ (Apo 14, 7-11).

Sankta Maria, Patrino de Dio, petu por ni

KAVALIRO DE MARIA

Nia tempo jam estis nomita apoklipsa. La tempo de la lastaj tagoj. *La tempo de grandegaj spiritaĵoj bataloj kaj grandegaj decidoj.* La Apokalipso de sankta Johano priskribas batalon inter la ĉielo kaj la infero en bildo de du grandaj signoj. Unu el la signoj estas virino vestita per la suno, kun luno sub la piedoj kaj sur la kapo krono el dek du steloj (komp. Apo 12,1).

La dua signo estas granda ruĝa drako kun sep kapoj, kun dek kornoj kaj sep kronoj sur la kapoj (komp. Apo 12,2) „Kaj la drako furiozis kontraŭ la virino, kaj foriris, por fari militon kontraŭ la restintojn de ŝia idaro, kiuj observas la ordonojn de Dio kaj havas la ateston de Jesuo“ (Apo 12,17).

La virino estas la Eklezio. La virino estas ankaŭ Maria. Drako estas Lucifero. La tempo antaŭ fino de la mondo havas senteblian trajton *marialan kaj luciferan.* La okazaĵojn ne plu eblas eksplikadi nur nature kaj nur homece. La fortoj ĉielaj kaj inferaj luktas sur mondbatalejo pri mondregado. *La regado de Kristo, aŭ antikristo.* La regado de Dio, aŭ de satano. Dio, aŭ diablo.

En tiu ĉi lumo estas necese rigardi kavaliron de Maria. Ni ne komprenas ĉi tiun vorton en la senco de iu asocio, sed ĝenerale, *kiel gardistaron de la Virino per la suno vestita kontraŭ demonecaĵoj, al Dio malamikaj influoj en la mondo.* Tial ĉiu, kiu batalas kontraŭ mondo en tiu ĉi armeo de Senmakula Virgulino, devas simili al granda signo surĉiele. Li devas esti vestita per la suno, havi lunon sub la piedoj, stelojn ĉirkaŭ la kapo. La kavaliro devas konveni al tiu standardo.

Kavaliro de Maria, venkanto kontraŭ la mondo, devas esti vestita per la suno. Tio ne estas nura poezia bildo, tio estas vero. Ni es-

pekuloj. Estu nia signo en malvarma, malhela nokto. Akceptu nin sub vian venkan standardon, kaj ni batalos kontraŭ granda drako. Nun kaj en la horo de nia morto.

tas infanoj de la Suno. Ni vere portas en ni Kriston, Filon de Dio, Lumon de la mondo, Sunon de la universo. Por tiu, kiu vivas en la graco, ĝi estas dogmo (komp. Efe 3,17), kiel estas dogmo, ke la Patro kaj la sankta Spirito, se ni estas en sanktiga graco, loĝas en ni vere, fakte kaj esence. Persone!

Ĝuste tio estas la senco de la supernatura vivo. Dio en ni! La Patro en ni! La Sankta Spirito en ni! Do ankaŭ la Filo de Dio, la Suno de la kreitaro, en ni. Kaj tial eĉ ni mem estas *filoj de Dio.* Sunoj. Lumoj de la mondo. Nur ke ni tion ne scias. Ni forgesis tion, kvankam tio estas en la Sankta Skribo. Ni nomiĝas filoj de Dio kaj ankaŭ ni ili estas (komp. 1 Joh 3,1).

La mondo nin ne konas (1 Joh 3,1). Sed la plej malbone estas, ke eĉ ni mem nin ne konas. Estas tio vera mizero kaj granda domaĝo, ke ni perdis konscion pri tio, ke ni estas filoj de Dio, do vestitaj per la Suno. Ke ĉiu el ni havas garantitajn rajtojn, kiuj havas pli grandan valoron ol kronoj reĝaj.

Emil Fidler diras: Ne estas ideo, kiu nin igus tiel liberajn kaj ĝojajn, tiel fierajn kaj feliĉajn kiel tiu ĉi konscio.“ Oni povus opinii, ke ĉe ni, la kristanoj, devus esti senĉesa jubilo kaj sonorado per ĉiuj sonoriloj. Kaj ĉu fakte? Ni ne povas voli, ke la mondo nin konu. *Unue ni devas mem koni nin.*

Unue ni devas mem scii, kiu ni estas. Unue ni mem devas konsciiĝi nian supernaturan, Dian grandecon. Tio nin plenigos per neesprimebla dankemo al la Patro, per kristana memkonscio kaj ĝoja espero je venko. La cetero mem alvenos.

La Virinon vestitan per la suno nomas la Eklezio timigan kiel starantajn armeajn virojn. La Suno de la graco elsendas fulmojn de la sankta kolero kontraŭ ĉiu, kio en la

mondo kontraŭas al Dio, kio en ĝi estas malbona, demoneca.

Oni diras, ke Moskvo timas ankoraŭ unu homon en la mondo: blankan oldulon en Vatikano. Lia trono elsendas fulmojn, voĉojn kaj tondrojn. Ne kontraŭ homoj, sed kontraŭ ĉiu falseco, kolero kaj demonismo en la mondo. Ke tion oni povus diri pri ĉiu vera kristano!

Revolucio, sendieco, falseco, infero devus *timi antaŭ ĉiu vera kristano* ĝuste tiel kiel antaŭ la papo, ĉar en li ili vidas Sunon, el kiu eliras fulmoj. Ili vidas en li Kriston, Lunon de la mondo.

Tial la unua postulo en batalo kontraŭ sendieco estas: vivu en sanktiga graco. havu en vi Kriston. Estu vestita per la Suno. Nur Kristo en vi vin igas nesuperebla venkanto. La mondo timas nur la homojn, kiuj vivas en sanktiga graco. Ankaŭ Moskvo.

La kavaliro de Maria, venkanto super la mondo, havas lunon sub la piedoj. Ne kiel starejon, sed kiel ion, kion ni surpaŝas, super kion ni devas superiĝi. La luno signifas aferojn pasemajn, surterajn, materiajn, tial duarangajn, kiujn ni povas eluzadi, kaj en la kazo de bezono, ilin rezigni.

La kristano en sanktiga graco, honoranto de Maria, travivas nuntempe malfacilan krizon. Materio klopodas subpremi kaj sufoki spiriton, natureco klopodas subpremi gracon. Ĉiam pli kaj pli ni estas materiismigitaj, materialismigitaj, mamoniismigitaj. Korpo kaj mono iĝis celo. La suno turniĝas ĉirkaŭ la tero, kvankam ni devus scii, ke la tero devas fizike eĉ morale turniĝi ĉirkaŭ la suno. Do kaj la korpo kaj la mono ĉirkaŭ la spirito.

La kristano en la sanktiga graco, honoranto de la Virgulino Maria, *regas la korpon.* La korpo kun siaj naturfortoj kaj instinktoj havas en la monda plano certan, de Dio donitan taskon. Ĝi devas servi al Kristo la Reĝo. Ankaŭ nia korpo apartenas al Kristo. Nuntempe faras *korpo revolucion.* Ĝi volas esti mastro, despoto. Lia la plej alta leĝo estas pasio, ĝuo, manĝo, trinko, volupto.

Ankaŭ la homo en sanktiga graco havas korpon, sed tiu estas subigita al konscienco, racio, spirito, graco, Kristo, volo de la Plejaltulo. Li ĝin regas per sobro kaj ĉasteco. En tio dependas propra nobela virto de la kavaliro de Maria.

Sed se volas kavaliro de Kristo venki la mondon kaj opinii kiel Maria, li devas subpiede havi eĉ mamonon. Li povas uzi la monon, sed li ne povas je ĝi kredi kiel je Dio, li ne povas sin apogi je ĝi kiel je Dio, li ne povas ĝin ami kiel Dion. Nuntempe oni la monon ne nur uzas, hodiaŭ ĝi estas adorata. La mono havas sian kulton, mamonisman. Kaj profesio de tiu ĉi kulto nomiĝas kapitalismo kaj socialismo. – Ĉiujn herezojn de tiuj ĉi ambaŭ profesioj kapablas eviti nur malmultaj katolikoj. Kaj la kavaliro de Maria devas esti unu el ili.

La kavaliro de Maria devas esti *malamikoj de kapitalismo kaj socialismo.* La monaferoj devas ĉe li estis demando de konscienco. Kaj tiun demandon li devas solvi laŭ eternaj principoj de la justeco kaj la amo. Mamonon li devas ekhavi sub piedojn.

La kavaliro de Maria, venkanto super la mondo, havas la stelojn super la kapo. Li ne nur devas ion havi en si, io esti, kaj ion havi sub si, kontraŭ si, kion li regas; li ankaŭ devas ion havi *super si.* Tio estas steloj, idealoj. Se tiuj steloj al la homaro estingus, ekestus sur la mondo malhela, senvoja, senkonsola nokto. En ĝi la homaro devus erarvagi, malesperi, frostiĝi.

La kavaliro de Maria ekregos nur tiam la ŝtormantan maron de la malfacilaĵoj, kontraŭoj kaj danĝeroj, se li havos stelojn super la kapo. Precipe tri: la kredon, esperon kaj la amon.

Li devas super la kapo vidi stelon de la *kredo.* Li devas pri sia afero estis tute certa, volante aŭdaci batalon kontraŭ moderna mondo, eble unu kontraŭ cent. Li devas scii, ke li havas veron, absolutan veron, ununuran veron. Li devas esti roko en la maro.

Li devas vidi surper la kapo stelon de la *espero.* La stelon, kiun neniu deprenos. La

stelon, kiun al li sur la firmamento lumigos ĉiopova, eterna, senlime bona Dio. La stelon, kiu neeraripove heroldas venkon.

Li devas super la kapo vidi stelon de la *amo*. La stelon, kiu al li montras Dion kiel patron, kiel la plej altan bonfaranton, kiel la plej altan bonon, kiel la amon.

Tiel li devas venki, eĉ se kontraŭ li komplotus la tuta mondo kaj la tuta infero. Eĉ se li centfoje estus sola kaj sola. Konkeranto de la mondo kun tiuj tri fiksjaj astroj super la kapo estas *ĉiam nevenkebla, ĉiam venka*.

Tio estas la kavaliro de Maria. Li havas ion el la ĉielo, ion el la suno, ion el la luno, ion el la steloj. La sunon kiel veston, la lu-

non kiel bazamenton, la stelojn kiel kaskon. Ni devas resti infanoj de Maria. Ankaŭ viroj. Ankaŭ junuloj. Sed kun tio kavaliroj de Maria. Ankaŭ virgulinaj. Infanoj de Maria, ĉar ni estas el familio de la Patrino de Dio. Kavaliroj de Maria, ĉar ekzistas milito.

„Kaj la drako furiozis kontraŭ la virino, kaj foriris, por fari militon kontraŭ la restintojn de ŝia idaro, kiuj observas la ordonojn de Dio kaj havas la ateston de Jesuo“ (Apo 12,17). Ni estu la homoj vestitaj per la Suno en la mondo de sendieca mallumo. Ni estu karakteroj kaj spiritoj de la tempo ni havus sub la piedoj. Ni estu stelhomoj en stelmondo de la katolikaj idealoj.

SUB STANDARDO DE LA SENMAKULA VIRGULINO

Kardinalo Gibbons diradis: „*Ni ne devas rigardi returnen*. Edzino de Lot retrorigardis, kaj mortis. Se ni retrorigardas, ni haltas. Ni do ne iras antaŭen. Sed tio estas komenco de fino. Gejunuloj rigardas antaŭen. Kiam ili atingas certan aĝon, ni devas multe rilati kun gejunuloj, por ne maljuniĝi. Gejunuloj havas planojn, esperojn, volon por estonto. *La gejunuloj kredas je estonteco*. Ili vivas en atendado de la grandaj aferoj.“

Insigno de la katolika volo por estonto estas standardo. *La standardo estas pli, ol peco da brodita silka ŝtofo*. Ĝi estas programo. Ĝi estas simbolo de tio, kion ni volas fari. La junularo ne devas longe pripensi, kion skribi sur sian standardon. Iu franco iam diris: „Ĉiuj katolikaj establaĵoj, kiuj kraŝis, neniĝis tial, ĉar en ili estis tro malmulte da Virgulino Maria.“ Do malmulte el tiu, kiu piedfrakasas la kapon de la serpento. El virino per la suno vestita. El Senmakula. La standardo de la katolika junularo, la estonta junularo de Kristo la Reĝo, devas esti *standardo de Maria*, standardo de pureco. La sukceson ni garantios ne nur per forta glavo, sed ankaŭ per *pura ŝildo*.

Hodiaŭ oni multe parolas pri sana kaj forta korpo. Sed en la sana kaj forta korpo povas enesti morala malfortulo kaj senkarakterata malkuraĝulo. Tial la katolika junularo

por sia standardo elektas ne la bildon de fortulo, sed de la plej pura Virgulino, Senmakula. *La pura homo estas pli grava ol forta kaj sana*.

La standardo de la Senmakula kiel standardo de la junularo principe esprimas, kion ni opinias *pri kulto de la korpo*. En lastaj dudek jaroj ni travivis en fako de korpokulto ne nur tempan fluon, sed renverson, *revolucion*. La revolucion de la korpo kontraŭ la spirito, la spirito de la Eklezio.

La korpo deskuas el si malnovajn moralajn ekleziajn principojn, kaj kiel papo kaj ankaŭ reĝo, surmetas al si mem la kronon sur la kapon. Se ne trompas nin ĉio, do la plej proksima estonteco kiel antaŭ diluvo apartenos al la korpo.

La standardo de la Senmakula kiel la standardo de la junularo estos signo de klasifiko. Ni devas decidiĝi. *Aŭ por malnova, katolika, aŭ por moderna, pagana opinio pri la korpo*. Aŭ por evangelio de la kruco ankaŭ rilate al la korpo, aŭ por evangelio de nelimigita ĝuo. Aŭ por animo kiel regantino super la korpo, aŭ por korpo kiel estonta hejma majstro, al kiu estas la animo servitino. Aŭ laŭ modelo de Maria ni supreniras la vojon de la ofero, ĝis iam ni estos ankaŭ kun korpo prenitaj en la ĉielon, aŭ ni falegas laŭ modelo de la mondo survoje de ĝuo, ĝis

ankaŭ kun korpo ni enfalos en la inferon.

Ni devas elekti. *Ekzistas radikala, nesolvebla malakordo* inter la katolika kaj moderna opinio pri la korpo, inter opinio de la Virgulino Maria, de la katolikaj sanktuloj, de ĉiuj noblaj animoj, kaj opinio de modernaj aŭtoroj, montrofenestroj, kinejoj, dancejoj, sportejoj kaj emancipitaj ekscesaĵoj. Sankta Paŭlo skribas en la 1-a epistolo al la Korintanoj: „*Ĉu vi ne scias, ke via korpo estas templo de la Sankta Spirito, kiu estas en vi?*“ (1 Kor 6,19).

Deliro de la moderna korpokulto havas kaŭzon en tio, ke oni ne pensas pri tiu ĉi frazo kaj ke konsidere al la korpo oni pli multe konsideras sciencon ol la Sanktan Skribon. *Je konvinko, ke la korpo estas templo de la Sankta Spirito, dependas en certa senco tuta kristana kulturo.*

Se estas korpo de la homo, kiu estas en la sanktiga graco, templo de la Sankta Spirito, estas solvita ankaŭ demando, kies estas la korpo. La korpo estas Dia. „*La korpo estas por Sinjoro,*“ skribas eksplicite sankta Paŭlo (1 Kor 6,13). Ĉiu membro havas sian celon por servo de Dio, tio estas devas siamaniere plenumi volon de la Plejaltulo, kiu estas ununura kaj ekskluziva posedanto kaj loĝanto de la homa korpo. La membroj de la korpo ne estas memstaraj. Nek okulo, nek lango, nek stomako, nek kruro, nek brako, eĉ ne alia organo. Ili ne povas pri si memstare decidi, ne povas fari, kion ili volas. Ilia la plej supera mastro kaj posedanto estas la Sankta Spirito, al kiu ili respondecas pri ĉiu movo.

Ĉi tie estas *absoluta monarkio*. La korpo estas Dia. La korpo estas por Dio. Tial ankaŭ ĉiuj agoj de la homa korpo devas celi pli grandan honoron de Dio. Ĉar ilin Dio volas kaj kiel ilin Dio volas. Ĉio devas esti servo de Dio. Ankaŭ laboro, manĝo, refortiĝo. Ĉio. La korpo estas Dia. Per ĉiu fibro ĝi estas regno de la Sankta Spirito.

El tio rezultas: La korpo estas templo (komp. 1 Kor 3,17). Tio ne estas nur pia frazaĵo. En la Sankta Skribo ne estas frazaĵoj. Tie estas nur eternaj, seneraraj veroj. Ĉar

fakte, vere kaj esence en ni loĝas la Sankta Spirito per sia graco, ni devas al la korpo de la kristano havi respekton kiel al la templo, kiu estas konsekrita al Sinjoro Dio kaj havas en tabernaklo la Plajsanktan Sakramenton.

Tial ne darfis estis la templo de la korpo malsanktigita. Ĉiu peko surkorpe de la baptita homo estas malsanktigo de la templo, kaj tial ĝi estas multe pli grava ol ĉe homo nekristano. Infamigo de la domo de Dio estas flanke de moralaj homoj opiniata bruteco. Kion ni do opiniu pri malsanktigo de la iranta templo de la Sankta Spirito, la homa korpo! Ĝi estas krimo en plena senco de la vorto kaj ni ne miras, kiam sankta Paŭlo, pledanto kaj apostolo de la kristana honorindeco de la homo, eldiras terurajn vortojn: „Se iu detruas la templon de Dio, tiun detruos Dio; ĉar la templo de Dio estas sankta, kaj vi estas tio“ (1 Kor 3,17).

Ruinigado de belaj temploj dummilite estis barbareco. Ĉiu tento estas ankaŭ barbareco, estas *ruinigo de la sanktejo*, kiun konstruis la plej alta artisto, mem la Dio; kiun konsekris mem la Sankta Spirito; kaj en kiu loĝas Spirito de la vero, amo kaj sankteco.

La korpo estas sanktejo. Kio estas laŭ tio la hodiaŭa modo kaj sopiro pri ĝuoj? Kion ni do pensu pri tiuj voluptemaj personoj sur niaj stratoj, kiuj ne aspektas kiel vivaj temploj de la Sankta Spirito, sed kiel paganaj idoloj de Venuso?

La nuntempa modo estas profanigo de la homa kaj kristana digneco. Inflammigo de la templo de la Sankta Spirito.

Mi ripetas: En tiu ĉi demando ne temas nur pri modaj opinioj, sed pri ekzisto aŭ neekzisto de la homa socio. Temas pri tio, ĉu la homoj restos homoj, temploj de la Sankta Spirito, aŭ ili bestigos. Tio ne estas nura tempa fluo, tio estas renverso de ĉiuj leĝoj de deeco kaj moralo. Estas tio revolucio. Se la ŝtato estas senpova kontraŭ revolucio kaj ne kapablas zorgi pri ordo, devas ĉiu civitano estis soldato.

La standardo ne estas ludilo, kaj des pli

ne la standardo de la Senmakula. Ĉe sanktigo de la standardo la eklezio preĝas: „Sinjoro Jesuo Kristo, via Eklezio estas kiel ordigita batalvico; benu tiun ĉi standardon, por ke ĉiuj, kiuj sub ĝi servas al Vi, Sinjoro de la legioj, je propeto de la plejbeata Virgulino Maria venku ĉi tie surtere kontraŭ siaj videblaj kaj nevideblaj malamikoj kaj post tiu venko ili meritu en la ĉielo regi pere de Vi, Kristo nia Sinjoro.“

Sub la standardo oni batalas. La katolika junularo devas ne nur soleni ĝojajn solenaĵojn, sed ankaŭ batali kontraŭ ĉiu malalteco, aroganteco, malpureco, kie ajn ili aperos.

Antaŭ kelkaj jaroj en iu urbo aperis aŭŝoj, kiuj etis moko al ĉiu dececo. La katolikaj so-

cietoj de junuloj de tiu ĉi urbo kaj ĉirkaŭaĵo aranĝis kunvenon kaj decidis pri rezolucio, ke oni la kompetentajn oficojn postulos, ke ili prizorgu moralan purigon de la stratoj, kioskoj kaj publikaj lokoj. Tuj post fino de la kunveno la partoprenantoj en la urbo forŝiris la skandaligajn aŭŝojn.

Ni devas realigi la vortojn de Gibbons: „La junularo antaŭenrigardas.“ Ĝi ne sunbruniĝas pigre en brilo de siaj malŝarĝoj. Ĝi vivas en atendo de grandaj aferoj, kiujn ĝi volas realigi. Unu el tiuj estontaj taskoj de nia junularo estas *batalo kontraŭ malpureco kaj malateco*. Katolika junularo, antaŭen sub la standardo de la Senmakula! Ek al la laboro!

EN TIU SIGNO VI VENKOS

Mi estas katoliko. Kaj katolikaj afero ne devas esti por mi fremda. Mezurilo de ĉio, kion mi pensas, parolas kaj faras, estas por mi prijuĝo de mia Patrino la sankta Eklezio. *Se ekzistas inter afero katolika kaj moderna konflikto, mi decidiĝos senprokraste por la afero katolika.*

La Patrino Eklezio estas pli aĝa ol moderna profesoro. Ĝi havas sperton de dek naŭ jarcentoj. Ĝi estas apostoleca. Ĝi havas pli grandan horizonton ol scienculo en sia studejo. Ĝi estas ĉie. Ĝi estas katolika, gvidata fare de la Sankta Spirito.

Tial mi ne hezitas kontraŭ fluo de nuntempo proklami la malgrandan aferon, kiun ni nomas rozario, kiel grandan rimedon de la savo, kiun Dio proponas al nia tempo. La rozario estas granda *mistero de la kredo*. La rozario estas granda *mistero de la venko*.

La rozario estas mistero de la kredo. Ĝi ne estas la preĝo senpripensa, sed esence *ĝi baziĝas en meditoj pri ĉefaj kristanaj veroj*. Ĝi ĝuste estas la preĝo de kontempluloj. En ĝia mezo estas grandaj eventoj de enkorpiĝo, savo, glorigo de la Filo de Dio: Kristo, savo de la mondo. Kristo: vojo, vero, vivo de la homaro.

Kiu asertas ion alian, ne scias, kio estas la

rozario. La rozario ne ovacias Kriston flanke, sed igas Lin centro de ĉiuj ideoj. Sed la rozario dume ne forgesas alian fakton. Kristo venis pere de Maria. Ne nur kristnaske en la jaro 1. Li venas ĉiam pere de Maria. Tiu ĉi fakton la rozario akcentas konstante, ĉe ĉiu Saluton Maria, ĉe ĉiu mistero: *Saluton, Maria*, kaj benata estas la frukto de via sino Jesuo. Kristo venas pere de Maria.

Ni ne povas paroli pri Maria, se ni ne parolas pri Jesuo. Ni ne povas paroli pri Jesuo, se ni ne parolas pri Maria. Maria kaj Jesuo apartenas al si kiel vojo kaj celo. Maria estas la vojo, Jesuo la celo. Ne estas vojo sen la celo kaj ne estas celo sen la vojo. Maria sen Jesuo estas maleblo.

Sed laŭ Dia ordo de la savo ankaŭ Jesuo sen Maria estas maleblo. Nenio venas al la Patro aliel ol pere de Jesuo, kaj neniu venas al Jesuo aliel ol pere de Maria. La esenco de la vojo al ĉielo estas tri stacioj: *Maria, Kristo, Dio*.

Kiu tion ne scias, ne estas kristano. Ni vidas, ke la rozario iĝas granda mistero de la kredo per tio, ke en mirinda varieco en dek kvin dekonaĵoj denove kaj denove kunigas Maria-n kun Kristo. Maria-n kiel vojon al Kristo, Kriston kiel vojon al Dio. La rozario

estas granda vojmontrilo de la kristana popolo.

Tiun veron ni povas esprimi ankoraŭ alimaniere. Maria estas patrino de la homa gento kaj precipe patrino de la kristanismo. Tio ne estas nura vorto, sed fakto. Maria estas patrino de la sankta familio, de tiu familio, en kiu Jesuo estas centro, sankta Jozefo protektanto. Kio alia estas la *Eklezio ol pli grandigita familio!* La ĉefaj personoj estas la samaj. Nur agadsfero etendiĝas ĝis fino de la tero, tio estas ĉien, kie Kristo havas siajn gefratojn, Maria infanojn kaj sankta Jozefo protektatojn.

Maria estas *patrino de ĉiuj vivuloj* supernature, kiel Eva estas la patrino de ĉiuj laŭnature. Neniu estas homo aliel ol pere de Eva, neniu estas infano de Dio ol pere de Maria.

Maria estas la patrino en plena senco de la vorto. El tio rezultas ĉio cetera. Maria devas havi *patrinecajn okulojn*, por vidi ĉiun mizeron kaj ĉiun danĝeron de siaj infanoj. Maria devas havi *patrinecan aŭdpovon*, por ekaŭdi eĉ la plej mallaŭtajn plorojn kaj ĝemojn sur la tero.

Maria devas havi *patrinecan koron*, por kunsenti ĉiun ĝojon kaj certasence ankaŭ ĉiun doloron. Maria devas havi *patrinecajn manojn*, por ĉie helpadi. Dio enmetis en ŝian patrinecan honorindecon ion el sia ĉieestanteco, ĉioscio, boneco, ĉiopotenco.

Ĉar per vortoj ni ne ludas, sed opinias tion serioze, do estas por ni memevidenta, ke Maria, estante patrino de ĉiuj kristanoj, tenas en la manoj eĉ sortojn de la Eklezio kiel ilon de Dia Providenco. *Ne estas eble skribi eklezian historion sen mencio pri Maria, kiel ne estas eble skribi historion de la Sankta Familio sen mencio pri Ŝi.*

Ĉio granda en la eklezia historio, ĉiuj periodoj de prospero, ĉiu venko de la katalika afero, ĉiu malvenko de la malamikoj de la Eklezio estas antaŭ ĉio verko, de Ŝi inspirita.

Se ni parolas pri Kristo, ni ankaŭ devas ĉiam paroli pri Maria, ĉe enkorpiĝo, en

savverko, en historio de animoj kaj la Eklezio. La ideo de rozario estas granda mistero de la kredo.

El tio fontas dua afero. *La rozario estas mistero de la venko.* La Eklezio atribuas malvenkon de komunisma sekto de albigensoj en mezepoko kaj de turkaj armeoj antaŭ ĉio al la preĝo de la rozario. Sankta Dominiko rigardis rozarion kiel ĉefan armilon kontraŭ herezoj kaj malvirtoj. Ĝi estas nia fusilo.

Leono la Dektria estas certe moderna papo. En siaj nemortemaj enciklikoj spiritvigle li pritraktas ĉiujn gravajn demandojn de la nuna tempo. Li akceptas potencon de organizo kaj gazetaro. Li multe atendas de lerta politiko kaj diplomatio. Sed ĉe tio li tre bone scias, ke ĉiuj organizoj, ĉiu scienco, ĉiu politiko malsukcesas sen supernatura helpo.

Tial ĉiujare, ĉiam, kiam proksimiĝas oktobro, li skribas al ĉiuj episkopoj kaj kredantoj enmondo: *La rozario estas granda savrimedo, kiu atingas pli profunden ol ĉiuj diplomatioj. Ĝi efikas pli potence ol ĉiuj organizoj kaj ĉiu gazetaro.* Kiuj preĝas, kaŭzas por la homaro pli ol oratoroj, redaktoroj, organizantoj, fondantoj, sekretarioj, deputitoj. Kiu preĝas rozarion, efikas je mondo per Tiu, kiu havas en etfingro pli multe da saĝo kaj potenco ol ĉiuj universitatoj kaj ĉiuj registaroj. Tion povas kompreni nur kristano. Sed la kristano tion kompreni devas.

En la rozario plenumiĝas tio, kion skribas sankta Paŭlo al Korintanoj: „Mi pereigos la saĝecon de la saĝuloj, kaj la kompetentecon de la kompetentuloj mi malaperigos. Dio elektis la malsaĝajn objektojn de la mondo, por hontigi la saĝulojn; kaj Dio elektis la malfortajn objektojn de la mondo, por hontigi la fortajn; kaj la malnoblajn objektojn de la mondo, kaj la malestimatajn Dio elektis, kaj eĉ la nerealajn, por neniigi la realajn; por ke neniu karno fieru antaŭ Dio“ (1 Kor 1,19; 27-29).

Laŭhomo dirite estas la rozario afero en la mondo la plej maltaŭga, por savi la homaron. En la okuloj de scienco ĝi estas tio, kio nenio estas: absurdeco, malforteco,

malŝatata nenieco. Kaj ĝuste tial la Eklezio estas konvinkita, ke la rozario estas granda mistero de la sukceso.

Se la kristanaj nacioj batalos en tiu signo kun kredo kaj konfido, ili venkos kontraŭ protestantismo, liberalismo, socialismo kaj komunismo. *Ĉiuj enmondaj herezojn venkas Maria.*

El tiu sociala kaŭzo ni preĝas la rozarion. Ĝi estas la preĝo de la *granda ofensivo*, preĝo de la batalanta Eklezio. Kiu sin sentas katolikece, preĝas kun ni.

Ni parolis pri tio, kio povus okazi. En la rozaria preĝo havas la katolikaj nacioj savrimedon kontraŭ proksimiĝanta katastrofo. Ĉu la kristanaj nacioj vere uzos tiun ĉi

rimedon? Kaj ĉu ili ĝin uzos tiel, por forpeli danĝeron? Ni dubas.

La katolikaj nacioj ne plu scias sufiĉe preĝi. Ankoraŭ ili scias deklari rezoluciojn. Ili kapablas paroli pri socialaj demandoj. Sed la katolikaj nacioj ĉiam pli kaj pli multe enprofundiĝas en sportojn kaj amuzadon, kaj multaj katolikaj societoj preskaŭ nenion plu kapablas ol realigi aferojn, per kiuj la popolon fremdigas de familioj kaj forkondukas de la servoj al Dio.

La rozario do ne estos la preĝo de la tuta Eklezio, sed de nur malgranda grupo, kiu la kristanecon traktas serioze. Kaj nia alvoko al preĝo de la rozario koncernas ilin.

ARMEAJ REGIMENTOJ DE LA VIRGULINO MARIA

En la festo de Prezento de la Sinjoro – Kandelfesto eliras la Eklezio el la preĝejo kun kandeloj. El tio oni ekkonas, ke ĝi ne maljuniĝas. Ne ĉiuj kuraĝas dume iri kun ĝi.

Inter la baptitoj kaj konfirmaciitoj estas multaj rezervemaj kaj duonecaj, multaj malkuraĝuloj forkurantaj de la standardo. Se ni volas eviti apostatecon kaj denove konkeri la perditan teritorion, ni devas kolekti kaj ekzerci por batalo tiujn, kiuj restis fidelaj. Tio estas antaŭ ĉio tasko de la triaj ordenoj kaj marialaj grupoj.

Firmeco kaj fidindeco de la eklezia tricentmila armeo hodiaŭ dependas je tio, kian spiriton kaj kian disciplinon havas tiuj elitaj regimentoj, triaj ordenoj kaj grupoj. Se misfunkcias tiuj regimentoj, nehavante freŝan ofenzivan spiriton, misfunkcias ankaŭ homamasoj, kaj la lumprocesio iĝas nur poetika gesto.

La standardo de tiu ĉi elito estas Maria. Senmakula, granda signo sur la ĉielo, la Virino vestita per la suno. La Eklezio pri tiu ĉi granda signo diras: „Bela kiel luno, bonega kiel suno, timiganta kiel vicigita armeo.“ *Pulchra, electa, terribilis.* Momanto de pureco, elekteco, braveco. La signoj de tiuj, kiuj apartenas al Maria: pureco, elekteco,

braveco. Al kiu mankas iu el tiuj ĉi karakterigaj ecoj, ne estas el pura mariala raso.

La pureco, senmakuleco. *Maria pulchra.* Jam du mil jarojn la pentristoj bildigas la Virgulinon Maria kiel enkorpiĝintan belecon. Sed tiu ĉi beleco estas nura rebrilo de ŝia senmakula anima pureco.

Neniam oni pri la beleco pli multe parolis kaj skribis ol nun. Sed ankaŭ neniam estis pli malmulte da konceptoj pri la beleco ol nuntempe. Neniam oni serĉis esencon de la beleco tiel multe en formo kaj koloro. La maljunaj havis pri tio klarajn ideojn: La beleco estas ekstera esprimo de la vero kaj bono. La beleco, vero kaj bono estas nedisigebla trio. Bela estas nur tio, kio estas vera kaj bona. Kio estas malvera kaj malbona, tio estas malbela.

La junularo volas *esti bela*. Estu. Sed oni ne forgesu, ke ĝi estas bela nur tiam, se ĝi estas *pura*. Juneca beleco estas pureco, kiu elradis el la tuta vivo. La moderna junularo ĉe ĉiu korpokulto kaj ĉe ĉiu moda rafinece ne plu estas bela, ĉar ne plu estas pura.

Al nia junularo redonos freŝan kaj brilan aspekton pli prefere marialaj grupoj ol sportaj societoj, pli prefere pekkonfeso ol banlokoj, pli prefere sankta komunio ol sunaj montdeklivoj, pli prefere graco ol naturo.

La Sankta Skribo al ni en libro Judit bildigis bildon de la granda pura beleco. Judit, volante iri al tendaro de Holofernes, ŝin ornamis per ĉiuspecaj ornamaĵoj. Ĉar ŝi tion ne faris el korpa voluptemo, sed el pia sinteno, tial, kiel diras la Sankta Skribo, la Eternulo tiun ŝian belecon multobligis, por ke ŝi la neatingeblan belecon al ĉiuj okuloj ĝin montru (komp. Jud 10, 3-4).

La armeestro de Asirianoj estis per ŝia beleco ensorĉita, kaj kiam li dormis, Judit detranĉis lian kapon. Judit, antaŭbildo de Maria, estas ankaŭ antaŭbildo de la katolika junularo. *Nur ĉasta beleco konkeras.* Nun nemakulita juneco iras venke tra tendaro de la mondo kaj senkapigas kapon de satano.

Elekteco. Maria electa. Maria ne estas kiel ĉiuj ceteraj. Maria estas kiel patrino de Jesuo per escepta Dia graco ŝirmita kontraŭ hereda kaj ĉiu persona peko. En tio ni ne povas Ŝin sekvi, ĉar Dio donis tiun ĉi privilegion nur al Maria.

Sed ni povas sekvi Ŝin en tio, ke Maria neniam iris la vojojn de tiu ĉi mondo. Se tio devis esti, Ŝi havis kuraĝon iri tutsola. Ne kiel ĉiuj ceteraj. Ĉiam per la vojo de la Sinjoro, per la vojo de devo. *Super Maria estis neniam pli forta persono en sekvado de Jesuo.* Ŝi verdire estas „*mulier fortis*, la virino brava“ el la Sankta Skribo (Sen 31,30).

Al Maria ni devas konfidi junularon, por ke Ŝi el ĝi eduku *novan generacion de fortaj personuloj.* El nia katolika junularo senigas ĉiun forton ĝuste senkaraktera, senkuraĝa devizo: Ja kiel ĉiuj ceteruloj! *Simia imito de ĉio, kion la mondo pensas, parolas, faras.* Gregeco en moderna kultura konkurado.

Tiel estas ankaŭ inter ni. *Memkonscia mariala devizo* en ĉiuj sferoj de la pensado kaj agado por nia junularo estas: *Ne kiel ĉiuj ceteruloj!*

La katolika *memstareco* en pensado. La katolika memstareco en parolado. La katolika mestareco en agado. Nek kongregacio, nek la tria ordeno devas esti organizo de homamaso. Neniam ĝi volas ĉiujn. Ĝi serĉas. Elektas. Devas esti kiel Maria *electa.*

Elektita. Elito.

Tion ni devas neniam forgesi, se ni estas anoj de la mariala grupo. Ni ĉiam devas *havi kuraĝon esti kun minoritato.* Kun tiuj, kiuj memstare pensas. Memstare volas. Staras sur propraj kruroj. Se la grupo perdas tiun ĉi fundamentan trajton, ĝi ankaŭ perdas rajton por sia ekzistado.

Braveco. Maria terribilis. Timiganta kiel viciĝinta soldataro. Ŝi piedtretas la kapon de la serpento. Nenio estas sur Ŝi molanima, nenio malforteca, nenio nedecidema, nek duoneca. En ĉio Ŝi estas kontraŭeco de Lucifero.

Tial Maria tiel bone konvenas por standardo kaj por junula medalo. Ŝia nomo estas kvazaŭ signalo. Kiu ĝin aŭdas, scias, ke ĝi devas ekstari kaj ekbatali.

Maria *terribilis.* Oni devus diri ankaŭ *Congregatio terribilis.* La mariala grupo timiganta kiel vicigita soldataro. Regimento, antaŭ kiu timas kaj mondo kaj infero. Tiaj estas hodiaŭ malmultaj. *Plej ofte neniu timas antaŭ ni.* Al ĉiuj jam estas bone en nia ĉeesto, maksimume iu estas ofte iom nervoza. Ni iĝis agrabla socio, kiu por neniu estas danĝera. Kiu vivas kaj lasas vivi.

Ni plu ne tro scias plenvoĉe kaj decideme protesti kaj laŭ tio agi. La vorton „ne“ ni ankoraŭ prononcas eble en iu fermita ĉambreto kaj ĉe ŝlosita pordo. Sed publike ni ĝin nur mallaŭte eldiras, por ke ĝin neniu aŭdu. *Nia la plej granda malfeliĉo ne estas kolerado de senpiuloj, sed malbraveco de bonuloj.* Nia la plej granda malfeliĉo estas niaj dormetantaj regimentoj.

Per marialaj grupoj ni devas en dormejoj de la kristaneco enportadi ĉiam pli da vivo. Per freŝa kaj ĝoja ofensivo kontraŭ malalteco kaj malboneco ni denove devas iĝi danĝeraj por la mondo kaj la infero. Maria *terribilis.* Se aperos marialaj regimentoj, devas skuiĝi kaj satano kaj la mondo.

Antaŭ ekiro se la lumprocesio en Kandelfesto la diakono vokas: „*Procedamus in pace. Ni ekiru en paco!*“

Nia junularo ne povas kontentiĝi nur kun

paradmarŝoj. Ĝi devas ekiri batalema kiel liberala junularo antaŭ cent jaroj kaj kiel nuntempa komunista junularo. Ĝia devizo devas esti: *Procedamus!* Ni ekiru! Antaŭen! Sed la nova junularo de la katolika agado ne devas kaj ne volas forgesi eĉ la duan flankon: *In pace*. Gvardio de la papo Pio la Dekunua diference de revolucia junularo batalas por la *paco de Kristo en regno de Kristo*. Ne nur ĝi ruinigas, sed ankaŭ konstruas. Ĝi volas ne nur funde purigi malnovan mondon, sed konstrui la novan mondon, pli bonan: la regnon de Kristo la Reĝo. Pere de Maria.

Laŭ traduko kaj eldono de Fratulinj de la Senmakula Koncipiĝo de la Virgulino Maria en Pĕrov, Ŝiřava, el la jaro 1935.

Prelato Robert Mäder (1875-1945), preposto de la preĝejo de Sankta Spirito el Basel, Svislando, unu el ĉefaj gvidantoj de Katolika Agado, doktoro honoris causa de Unuversitato en Freiburg, nelacigebla batalanto kontraŭ liberalismo, komunismo, naziismo, aŭtoro de multaj libroj.

